l'écologie : les verts

## Ekologio, la verduloj

# La viv-elekto

## POLITIKA KAJ HOMA DEFIO, KIU DECIDOS PRI NIA ESTONTECO

55 000 hektaroj da arbaroj, ĉiutage detruitaj, la ozon-tavolo malpotencigita, la amasigo de disradiitaj rubaĵoj, la haŭt-kanceroj dekobligitaj dum 10 jaroj..., la armilar-multproduktado...

Tiel la kapitalismo, Okcidente, kiel la socialismo, Oriente, kreskigis la gigantajn riskojn, kiujn ni povis prikonscii tra la katastrofoj en Ĉernobil, Sevezo, Bopal, Meksik-urbo, Bazelo, k.t.p.

Nuntempe, la novaj teknologioj (bioteknologioj, elektroniko, informadiko...) kiuj ekmisordigas la produktadon de havaĵoj kaj de serviloj povas esti uzataj por la plej bono aŭ por la plej malbono.

- promocii la etajn produkt-unuojn kaj la kunvivadon, regi la energion, malaperigi iajn mallogajn taskojn.
- aŭ plifortigi la estrecon de burokrata socio, kreskigi la ampleksegon (nukleaj centraloj, generatoregoj...), faciligi la eksperimentojn kaj la disigon de nocaj bakterioj...

Simpla estas la demando :

- ĉu ni toleros mondon, kiu kreskigas la senlaborecon, la malegalecon kaj la planed-poluciadon, mondon kiu pli kaj pli neniigas la Homon kaj igas ĝin nura ekonomiero ?
- aŭ ĉu ni agos por ke la plezuro de propraj aktivaĵoj estu pli grava ol la neceso de pagita laboro ? ĉu iri al iu ekologia socio, en kiu ekonomio ne plu superos la socialajn rilatojn kaj ne plu detruos la Naturon ?

# La verdula projekto : rajto al digneco por ĉiuj en socio kapabla harmonie vivi kun la naturo

- Ekologio estas ia "legado" de l'homa historio, kiu privilegias la vivon kaj la ekfloriĝon de la persono en kunvivebla socio.

  Estas ĝi kritiko pri civilizacio bazita sur iu potenc-deziro kaj amasigo de konkretaj materiaj bienoj, elĉerpanta la planed-fontojn kaj minacanta la postvivon mem de la homaro. Estas ĝi aserto pri cies rajto al amo, al beleco, al digno.

- La rilatoj kun la aliaj vivo-formoj kaj popoloj tro ofte fontas el detrua ekspluatado aŭ el sklavigo. Tion ni devas anstataŭigi per kunagado kaj respekt-rilatoj, laŭ jenaj ekzemploj :
  - rifuzi la difektadon de nia medio kaj restarigi en ĝiaj pleneco kaj diverseco la vivon, ĉie kie ĝi estis ĉu detruita, ĉu difektita ;
  - mastri nian ekonomion, kies evoluo devas baziĝi sur kolektivaj decidoj kaj ne sur la internaciaj trudajoj aŭ la elektoj de la teknokrato ;
  - havi pac-strategion kiu baziĝas sur kreskado kaj justeco sed ne sur armilar-amasigo, engaĝiĝi per firma promeso pri senarmigo, unue nuklea ;
  - certigi la ekzisto-rajton de ĉiujspecaj kulturoj.

- La senbrida konkurado, kiu fontas el la potenc-deziro okazigas eksternorman riĉofonto-malŝparadon kaj la ekskludon de la personoj kaj socioj, kiuj ne havas venk-rimedojn. Nur solidareco :
  - povas malaperigi senlaborecon sen ke ni devu vendi armilaron, konstrui troajn kaj danĝerajn atom-centralojn aŭ senutilajn aŭtovojojn ;
  - kapablas konservi socian koheron ;
  - povas elmizerigi la malriĉajn landojn, ĉesigi la disrabadon de iliaj riĉofontoj, bremsi la tutmondan naskiĝ-kvanton kaj la migradon, eviti la estontajn konfliktojn inter Nordo kaj Sudo.

# *La verduloj ne nur analizas aù krit*
# *Ili prezentas konkretajn kaj efekti*

## Jen, ekzemple, kelkaj pro
## taj en niaj diversaj broŝur

### • PRI RESPEKTO DE L'HOMA DIGNO :

Agnosko de ĉies kultur-identeco, inkluzive la alilandaj restadantoj (lingvo, enkonduko en hom-grupon, ligitan kun iu ajn teritorio), estreco de l'propra estonteco (graveco de l'ekonomi-aùtonomio, socio-demokrateco), ĉiutaga vivo en ĉirkaŭĵo kiu certigu korpan kaj spiritan ekfloriĝon.

### • PRI REKONKERO DE IU ALTKVALITA MEDIO

Plej gravas la restarigado de l'aer- kaj grund-kvalito, la rea prizorgado de l'urbaj kaj kamparaj pejzaĝoj, ekzemple. Difini la devojn kaj respondecon de l'urbestroj, de l'publikaj instancoj (Elektro-Gaso-kompanio, lokaj kolektivumoj) same kiel de l'privataj, kaj faciligi la kontrolon, fare de la loĝantaro de l'urboplanism-decidoj (devigaj antaùplanoj, referendumoj).

### • PRI FORMALAPERO DE LA NUKLEA ENERGIFONTO

La energi-politiko devas esti bazita sur la volo mastri la konsumadon de energio per iu ambicia disvolviĝo de l'energi-ŝparoj, la plena ekuzado de la sun-energio, de la geotermio, de la biomaso, dum oni samtempe redonu ilian ĝustan lokon al la hidroelektro kaj karbo (likvigo, k.t.p.).
Eblos, post 10 jaroj, ne plu uzi nuklean energion, liberigi la mon-sumojn blokitajn en senutilaj centraloj, profite al aliaj ekonomi-branĉoj kaj krei multajn labor-postenojn.

### • PRI REGIONA AÙTONOMECO

Devas la regionoj ricevi verajn decid-povojn kaj vidi siajn agad-eblecojn pligrandigitaj pri instruado, teritori-taùgaranĝo, pri areo kaj mediar-kontrolo, pri kulturo, ekonomio, energio... Ili devas disponi financajn rimedojn adekvatajn por ellabori kaj konkretigi disvolviĝ-politikojn, kiuj kongruu kun la personeco kaj monrimedoj de ĉiu teritorio.
Estos agnoskitaj la regionaj dialektoj kadre de statuto, kiu faciligos ilian longdaùrecon.
La landlimaj regionoj starigos privilegiajn kaj senperajn rilatojn kun la samlimaj regionoj alilandaj.
La Senato fariĝos Region-konsilio.

**La multaj problemoj ĉi-tie levitaj kaj ties proponitaj solvoj n**
**Temas pri elekto de nia progres-tipo !**
**Ni nenion povas sen vi.**

# KUN VI, KUN LA VERDULOJ, ŜA

# ...kas, ...igeblajn proponojn.

# ...onoj inter tiuj, kiuj estas pritrakta-... ...j dediĉitaj al politika vivo.

## • PRI LABOR- KAJ PROFIT-DISPARTIGO

Signifo-plena malgrandigo (komence, iĝos la labor-semajno 35 hora) de la labor-daŭro devas esti planita per ĝenerala leĝo (kadro-leĝo). La kondiĉaro de tiu redukto estos pridiskutita laŭfake : ĉu per taga, semajna, jara redukto, ĉu per konsento pri sabatjaro.
La salajra malgrandigo devos esti tute kompensita por la salajroj la plej malaltaj kaj des pli reduktiĝos la monkompenso, ju pli altiĝos la viv-rimedoj.

## • PRI GARANTIO DE L'SOCI-SALAJRO

Aktivecon pravigas sole utileco de ĝia produktaĵo aŭ de la servoj, kiujn ĝi proponas kaj ne la labor-postenoj, kiujn ĝi povas disponigi.
Ĉiu persono rajtas sufiĉajn mon-rimedojn por dece sin nutri, sin vesti kaj por akiri taŭgan edukon. Tiuj 2 principoj instigas proponi garantion pri sociaj mon-rimedoj, en ĉiuj kazoj de nelaboro (senlaboreco, maljuneco, malsaneco...) kadre de socia solidara protektado (ununura reĝimo), malcentralizita kaj, iom post iom, fiskalizita.

## • PRI PROVO KONCERNE NEPERFORTAN CIVILAN DEFENDADON

De ĝi dependas la postvivo de l'Homaro. Elemento de pac-strategio estas la disvolvado de civila senarma defendo, ekonomie kaj politike atak-malinstiga (ekonomia aŭtonomeco, neperforta rezistado kaj nekunlaborado) por eventuala atakanto. Daŭre havi armitan militistaron estos devige ĝis oni funkciigos civilan defendadon. Respondeciĝos la loĝantaro, demokratiiĝos la armeo kaj plifirmiĝos ĝia rolo pure defenda. Devos la junuloj elekti ĉu la klasikan militservon, ĉu same longan civil-servon.

## • PRI SAN-RAJTO

La san-rajto konsistas ne nur en la rajto je kuraciloj. Sana nutrado, ricevita tra agrobiologíaj metodoj, la prirespondecigo dank'al edukado fronte al la toksikomanio, tabako, alkoholo, alireblo al dolĉaj terapioj agnoskitaj, sed ankaŭ l'aer- kaj akvo-salubrigado, la libertempo-kreskado, la plibonigado de l'viv-kvalito, plibonigas la loĝantaro-sanstaton.

## • PRI BATALO KONTRAŬ SOCIAJ STREĈITECOJ

Malpliigi senlaborecon, plibonigi la viv-kvaliton en la amas-loĝejoj, faciligi la enmigrantar-integradon interalie per ties alfabetigado kaj partopreno en la loka vivo povas mildigi la sociajn streĉitecojn. Cele al nova civitaneco, voĉdonrajto ĉe lokaj balotoj post trijara loĝado, elektebleco post kvin jaroj. Proponas la Verduloj starigadon de konsilioj pri socia integrado kaj pri interkultura dialogo en la urboj de pli ol 10 000 enloĝantoj.

**...itas pli bonan traktradon ol ridindan pridiskuton far la politikista sfero.**

# ...ĜIĜAS LA ASPEKTO DE LA POLITIKO !

# *Iu identeco*

Por promocii alian manieron politiki, la Verduloj starigis ekologian forton, sendependan de la tradiciaj partioj. Temas pri organizo neekskludema preta dialogi kaj en rilatoj kun la penso-fluoj kiuj, nuntempe, vivigas la civilan socion (mediprotektantoj, regionemuloj, Tria-kaj Kvaramondistoj, feministoj, neperfortuloj, alternativuloj...) ; movado kiu enradikiĝas en asocian vivon kaj surlokan agadon, kaj preferas ĉerpi sian inspiron el la ĉiutaga vivo pli ol el antikvaj ideologioj liberalaj aŭ marksismaj.

# *Pribalotan estintecon*

## 1ª historia periodo, 1974-1983 : la ekoj de la politik-ekologio

**1974** : Prezidento-Elektado. René Dumont, ekologi-kandidato, ricevas 336016 bultenojn (1,3 %).

**1977** : Magistrat-balotado. La ekologiistoj larĝe superpasas 5 % en multaj urboj. Nur 30 estas elektitaj pro la sistemo de la plimulto.

**1978** : Deputita elektado. La Movado prezentas gekandidatojn en 168 el la 490 distriktoj kaj ricevas meze 4,4 % (2,2 % el tuta Francio). Neniu deputito pro la sistemo de la plimulto.

**1979** : Eŭropa balotado. Ricevas la Movado 890 722 balotilojn (4,5 %). La necesa procentaĵo (5 %) por havi deputitojn kaj rehavigi al si la elspezitan mon-sumon ne estas atingita, kio kuntrenas la financan ruinigon de la Ekologia Movado.

**1981** : Prezidento-elektado. Brice Lalonde, kandidato de "Hodiaŭ Ekologio", ricevas 1 118 232 balotilojn (3,8 %).

**1983** : Magistrat-balotado. Kandidatiĝas la "Verdaj" listoj en pli ol 100 gravaj urboj kaj ricevas — meze — 5,4 % (ĉirkaŭ 300 geelektitoj).

## 2ª historia periodo, 1984-1988 : naskiĝo kaj plifirmiĝo de la Verduloj

**1984** : 29a de januaro en Clichy (apud Parizo) fondo de l'Movado : "La Verduloj", kiu unuecigas la 2 grupojn, kiuj interesiĝas pri politika ekologio (Konfederacio kaj Partio Ekologiaj) kaj ĉesigas la periodon de la estintaj koalicioj mem malaperigeblaj.
17an de junio : Balotado pri Eŭropa Parlamento : ĉe sia unua apero sur la politika scenejo, la listo : "Les Verts-Europe-Ecologie" ricevas 678 826 balotilojn (3,4 %). Por la unua fojo, la kandidatiĝinta Movado daŭre ekzistas la postan tagon kaj starigas konstantajn strukturojn.

**1985** : la 10an de marto, pozitiva provo (kanton-skale) por la Verduloj. Iliaj kandidatoj transiras la 5 % limon en pli ol 100 kantonoj el 170. Oni tanĝis la 14 % en Alzaco.

**1986** : la 16an de marto. La Movado "Kun la Verduloj por ekologio" prezentas 28 departementajn listojn al deputitar-balotado (meze : 2,44 %) kaj 49 listojn al regionaj balotadoj (3,38 % meze). Tri el ili estis elektitaj : Andrée Buchmann kaj Antoine Waechter en Alzaco, Didier Anger en Sub-Normandio.

**1988** : la 24an de aprilo : Prezidento-Elektado. Je l'granda surprizo de l'amas-komunikiloj, Antoine Waechter ricevas 1 146 000 balotilojn kaj 3,8 %. Jen firma bazo por ebligi Verdulan antaŭeniron.
La 25an de septembro : kantona balotado, 340 "Verdaj" kandidatoj, en tuta Francio, ricevas meze 6,8 %. Ili transiras la 5 %-limon en 240 kantonoj kaj transpasas 20 %-limon en 5 kantonoj. Tri kandidatoj rajtas partopreni la duan elektadon sed malvinkas.

## 3ª historia periodo, 1989... : la Verduloj fariĝas politika forto

**1989** : Grava Verda antaŭeniro dum la magistrat-balotado la 12an kaj 19an de marto. 175 "Verdaj" listoj ricevas meze 9 % la unuan fojon, kun rezultoj super 15 % en Alzaco, en Manche, en Seine-et-Marne kaj en tiuj urboj : Le Puy, Istres, St-Egrève...
Pliampleksiĝas la sukceso la 2an fojon, la Verduloj iras de 12,4 % ĝis 15,1 % en la kvardeko da urboj en kiuj ili daŭre kandidatiĝis, kun la eksterordinaraj rezultoj por l'ekologiistoj : 35 % en St-Pol/Mer, 28 % en Equeurdreville, 24 % en Colmar kaj en Lognes, 23 % en Thonon, 22 % en Le Puy kaj en St-Brieuc, 21 % en Vannes, 20 % en Lorient, 19,5 % en Limoges kaj Cholet, 19 % en Caluire...
Sume, eniras magistratojn pli ol 600 Verduloj, el kiuj dek kvin iĝas urbestroj kaj kvardeko vic-urbestr-in-oj.

**1989** : ● **Juin:** Profitante la elanon akiritan dum la lokaj balotoj, kaj la subitan intereson de la amaskomunikiloj, kaj pri la Verduloj, kaj pri ekologio, la listo "Les Verts Europe Ecologie" ricevas 10,6 % de la balotiloj al eŭropaj balotoj, igante la Verdulojn la kvara franca politika forto. Aliloke, en Eŭropo, la Verda impulso ĉie sentiĝas, modere en Germanio (8,4 %) kaj en Luksemburgio (6,5 %), forte en Belgio (14 %). La italaj Verduloj, okaze de sia unua grava baloto atingas 3,8 % al kiuj aldoniĝas la 2,4 % de la listo "Arc-en-Ciel". La plej signifa sukceso estas akirita en Britio, kie la "Green Party" atingas 15 % de la balotiloj, sed neniu deputito pro la plimulta sistemo.
Naŭ membroj de la franca Verda listo estas elektitaj ĉe la eŭropa Parlamento (sep Verduloj kaj du kandidatoj ekster-movadaj) ; post duona mandat-periodo (januare 92) ili estos anstataŭitaj de siaj respektivaj kun-elektitoj kiuj sekvis ilin sur la listo kaj kiuj laboras ĝis tiam ĉe la eŭropa Parlamento kiel parlamentaj asistant(in)oj.
La Verda grupo ĉe la eŭropa Parlamento nombras 29 deputitojn, ĝi estas la kvina grupo laŭ la nombro, ĝi enhavas unu vic-prezidanton de la Parlamento kaj unu komisionan prezidanton (Antoine Waechter, ĉe la komisiono pri regiona disvolvado kaj teritoria planado).

# Senlima movado

## Eùropon konstruis la ekologiistoj antaù ĉiuj

Naskiĝinta en Francio, kie la sistemo ankoraù ne ebligas al ili eniri Nacian Asembleon (per vera proporcia sistemo, havus nun la Verduloj pli ol 20 delegitojn en tiu Nacia Asembleo), la Verda Movado disvastiĝis tra tuta Eùropo. Nun, havas la ekologiistoj parlamentan delegitaron en Svisio, en FRG, en Belgio, en Luksemburgio, en Italio, en Aùstrio, en Finnlando, en Svedio, en Portugalio kaj eĉ — de marto 89 — en Sovet-Unio. Ekzistas Verdaj Partioj en Irlando, en Britio, en Hispanio, en Danlando, en Norvegio kaj en Nederlando.

Dum la perturboj, kiuj nun skuas la centran kaj orientan Eùropon, la ekologistoj ludis kontestan rolon, ofte ĉefan, pro la drama situacio de la ĉirkaùaĵo (Bulgario, Baltaj Landoj, Hungario...). Politikaj ekologiaj movadoj strukturiĝas en ĉiuj orientaj landoj kaj partoprenos la venontajn liberajn balotojn (en RDA, Ĉeko-Slovakio, Rumanio...). Ekster Eùropo, la Ekologi-Movado same ekzistas en Meksikio, en Brazilio, en Kanado, k.t.p.

Foje malsame agante per siaj metodoj, pli malofte per la elektitaj strategioj, la Eùropaj ekologiistoj havas la samajn viv- kaj soci-komprenojn. Ili regule kunvenas, kadre de Internacia Kunordigado (Eùropaj Verduloj) por kompari siajn vidpunktojn. La 5a kongreso de l'Eùropaj Verduloj okazis en Parizo en aprilo 89.

La Verduloj sin prezentas kiel Movado kapabla trudi la ekologian politikon, kiu grave mankas en Francio, en Eùropo kaj en la tuta Mondo. Ili celas sentivigi la publikon kaj modifi la registar-decidojn. Estas nepre necesa ekologia politiko, fundamenta kaj konstanta, por ke Eùropo kaj nia tuta planedo pluvivu.

Pro la grava loko kiun ĝi okupas, Eùropo havas eblecon mastri kaj protekti la naturajn riĉofontojn kaj la biologian kaj komunan havon, alporti solvon al senlaboreca problemo, rifuzante la senbridan konkurencon, kiu akompanas la nuntempe uzatajn ekonomi-sistemojn. Ĝi krome, havas eblecon respondi la tutplanedajn defiojn, kiel la loĝantar-kreskadon kaj la landar-disvolviĝon en la Tria Mondo.

# Organizo

**LA UNUARANGECO DE LA REGIONOJ.** La regionoj organiziĝas tute sendepende kaj elektas rekte la tri kvaronojn el la membroj de la Inter-Regiona Nacia Konsilio (CNIR). Kunordiganta instanco de la Movado, la CNIR agadas kiel leĝodona povo kaj konsistas el cento da membroj.

**REPREZENTADO DE LA MINORITATOJ.** La lasta kvarono el la CNIR estas elektita, proporcie, de la jara ĝenerala Asembleo, kiu kunigas ĉiujn anojn kiuj tion deziras, kaj kies funkcio estas decidi pri la orientadoj de la Movado.

**KOLEGARA PLENUMPOTENCO.** La CNIR elektas plenuman kolegaron grupantan hodiaù 18 personojn. Tiu lasta havas nek Prezidanton, nek ĝeneralan sekretarion, kaj funkcias kiel taĉmento, kie ĉiu plenumas precizan respondecon. Kvar el ĝiaj membroj, speciale, havas la funkcion esti la naciaj proparolantoj de dudeko da komisionoj ŝarĝitaj studi, ĉiu el ili, specialan kampon (sano, enmigrado, defendo, k.t.p.).

**REKTA DEMOKRATIO.** Je la peto de 10 % el la anoj, la Plenuma Kolegaro nepre devas organizi referendumon kies rezultato estas decidiga.

# Aliĝpeto

**Resendu ĝin al la sidejo de la regiona organizo de la Verduloj, aù se ne, al**

**La Verduloj, 19 rue Titon, 75011 Paris, tel. (1) 43 79 38 38.**

**Mi, subskribinto, Familia nomo : . . . . . . . . . . . . . . . Persona nomo : . . . . . . . . . . . .**
**Naskiĝinta la : . . . . . . . . . . . . . loĝante : . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .**
**. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Tel : . . . . . . . . . . . . .**
**ano el nenia politika partio, leginte la regionajn (se ili ekzistas)**
**kaj naciajn statutojn deklaras aliĝi al**

LA VERDULOJ

Dato : . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . subskribado :

Informoj por starigi banko pri kompetentecoj :
Profesia funkcio : . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .
Diversaj kompetentecoj : . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

---

La abono al *Vert-Contact* estas sendependa de la aliĝo al la Verduloj.
Mi abonas *"Vert-Contact"n*, semajna gazeto pri ekologiista informado : 140 FF jare, 80 FF duonjare, 50 FF kvaronjare.
Speciala tarifo, nur por la anoj : 60 FF jare.

---

Les Verts, 19 rue Titon, 75011 Paris. ☎ (1) 43 79 38 38. Télécopie (1) 43 79 30 44. Minitel 36.14 LES VERTS.
Les Verts au Parlement européen, 288 Bd St-Germain, 75007 Paris. ☎ (1) 40 63 40 14. Télécopie (1) 45 51 52 53.
Traduktita en esperanton de Ekologio-Esperanto, 38 rue Jean-Moulin, F-33220 Ste-Foy-la-Grande.

Flugfolio presita sur reuzita papero. Eldonita de la Verda Grupo ĉe la Eùropa Parlamento. Presejo : **Imprimerie Petitjean**, 10 r. des Graveurs, 90500 Beaucourt.